

AKADEMIO INTERNACIA DE LA SCIENCOJ

Accademia
Internazionale
delle Scienze

International
Academy
of Sciences



San Marino

Internationale
Akademie
der Wissenschaften

Académie
Internationale
des Sciences

PROGRAMO

de la DUDEKKVINA SANMARINECA UNIVERSITATA STUDADSESIO SUS 25

Nitra — Komarno (Slovakio)
2002.08.30 – 09.08 / 1701-1702 pFR

Venticinquesima Sessione Universitaria Sanmarinese
dell'Accademia Internazionale delle Scienze (AIS) San Marino

Fünfundzwanzigste Sanmarinesische Universitäre Studientagung
der Internationalen Akademie der Wissenschaften (AIS) San Marino

Twenty-fifth Sanmarinian University Session
of the International Academy of Sciences (AIS) San Marino

Vingt-cinquième Séance Universitaire Sanmarinienne
de l'Académie Internationale des Sciences (AIS) San Marino

*Laborlingvoj · Lingue di lavoro · Arbeitssprachen · Working languages · Langues de travail ·
Pracovné jazyky budú:*

la Internacia Lingvo (ILO) · italiano · Deutsch · English · français · slovenčina

Adreso de la ĉefa sesiejo:

UKF, Universitato „Filozofo Konstanteno“,
Trieda A. Hlinku 1, SK-949 01 Nitra
(tel./faks. de la lokaj organizantoj: +421 37 6511013)

Oni akceptas la partoprenantojn semajnfine – ĉe la strato Dražovska 2 (ĝis dimanĉo posttagmeze; enskribiĝo al la kursoj okazos dimanĉe, la 1-an de septembro 2002 ekde la 18:40) kaj ekde lundo – ĉe la strato Tr. A. Hlinku 1.

La studadsesio okazos en du urboj, komenciĝos en Nitra kaj estos daŭrigota ekde ĵaŭdo posttagmeze en Komarno, kiu situas en 80-kilometra distanco de Nitra. En Nitra la programo distribuiĝos al du lokoj. Ĝi okazos parte en la konstruaĵo de la studenta hejmo ĉe la strato Dražovska 2 (por la komenca semajnfina programo, kaj por la Akademia Forumo), kaj por la cetera programo en la konstruaĵo de la Pedagogia Altlernejo (Tr. A. Hlinku 1). En Komarno ni sesios en la konstruaĵo de la gimnazia lernejo.

I. OFICIALAĴOJ KAJ ALIAJ ARANĜOJ

dato	horo	okazaĵo	salono
1.09, dimanĉo	11:00-13:00	senatkunsido (nepublika)	*Galilei
	14:00-16:00	ekzamenofico (membrarkunsido)	*Galilei
	16:30-18:30	ekzamenofico (konsultoj)	*Galilei
	ekde 20 h	interkona vespero	Hotel Artin
2.09, lundo	11:30-12:30	malfermo de la 25-a SUS	Boulanger
	12:40-13:10	Asembleo de la Subtena Sektoro	Descartes
	18:30-20:00	forumo pri Akademiaj Rekomendoj	*Boulanger
3.09, mardo	18:40-19:30	sekcikunsidoj	sekcisalonoj
6.09, vendredo	10:00-13:00	inaŭguro de Academia Kelemantia	
7.09, sabato	11:30-13:00	simpozio „Dialogo de la Kulturoj“	
8.09, dimanĉo	9:00-11:00	disputa forumo	
	15:30-16:20	27-a Ĝenerala Asembleo de SciS.	Boulanger
	16:30-17:15	fermo de SUS	Boulanger

*ĉe la strato Dražovska 2

kursive: aranĝoj ne SUSaj; ekzistos aparta informilo

II. SCIENCAJ KURSOJ KAJ PRELEGSERIOJ

La sekvaj kursoj validas po unu studunuon kaj okazos ekde lundo (2002-09-02) ĝis sabato (2002-09-07) dum la menciitaj tempointervaloj.

Kibernetiko (salono Schmidt)

K 01 OProf. Hans-Dietrich QUEDNAU dr. / ISKano Radojica PETROVIC mr

Datenbankoj

- o 2a de septembro: 8:00–9:30; 3a kaj 4a de septembro: 13:45–15:15;
- o 5a de septembro: 8:00–9:30.
- Fina kursekzameneto: ĵaŭde, la 5an de septembro: 10:30–11:00.

Humanistiko (salono Komenský)

H 01 OProf. Fabrizio PENNACCHIETTI dr., Torino (I)

Eroj por mezorienta kompara literaturo

- o 3a de septembro: 11:20–12:50, 17:00–18:30;
- o 4a de septembro: 11:20–12:50, 17:00–18:30.
- Fina kursekzameneto: merkrede, la 4an de septembro: 19:05–19:30

La kurso temas pri literaturajoj (rakontoj ktp.), kiuj migris aliformigante de judaj aŭ kristanaj tekstoj (hebre-, sir-, kopt- aŭ grek-lingvaj) al islamaj tekstoj (arab-, pers- aŭ turk-lingvaj), kaj en kelkaj kazoj revenis al juda aŭ kristana literaturoj.

H 02 AProf. Hans EICHHORN dr. med. habil., Belzig (D)

Alternativoj al la nuntempa danĝera psikiatrio,

- o 5a de septembro: 14:00–15:45, 16:00–17:45;
- o 6a de septembro: 8:00–9:30, 16:00–17:45.
- Fina kursekzameneto: vendrede, la 6an de septembro: 18:00–18:30

Struktursciencoj (salono Euklides)

S 01 OProf. Carlo MINNAJA dr., Padova (I)

Eroj por historio de matematiko

- o 3a de septembro: 8:00–9:30, 15:20–16:50;
- o 4a de septembro: 8:00–9:30, 15:20–16:50.
- Fina kursekzameneto: merkrede, la 4an de septembro: 18:35–19:00

Filozofio (salono Descartes)

F 01 OProf. Dr. Helmut ANGSTL, München (D)

Enkonduko en la logikon

- o *2a de septembro*: 9:40–11:10, 15:20–16:50;
- o *3a kaj 4a de septembro*: 9:40–11:10.
- Fina kursekzameneto: ĵaŭde, la 5an de septembro: 9:45–10:15.

Morfosciencoj (salono Gandhi)

M.01 AProf. Dr. habil. Eva POLÁKOVÁ, Nitra (SK), ADoc. Mag. Alicja LEWANDERSKA-QUEDNAU, Freising (D)

Preparado de filmoj por reportajaj celoj

- o *2a de septembro*: 9:40–11:10, 13:45–15:15;
- o *3a kaj 4a de septembro*: 9:40–11:10.
- Fina kursekzameneto: ĵaŭde, la 5an de septembro: 9:45–10:15.

M 02 OProf. Hans-Dietrich QUEDNAU dr., Freising (D), ADoc. Mag. Alicja LEWANDERSKA-QUEDNAU, Freising (D)

Aplikado de aŭdvidaj kaj plurkanalaj rimedoj en instruado

- o *3a de septembro*: 11:20–12:50, 17:00–18:30;
- o *4a de septembro*: 11:20–12:50, 17:00–18:30.
- Fina kursekzameneto: merkreda, la 4an de septembro: 19:05–19:30

M 03 OProf. Dr. habil. Helmar FRANK, Paderborn (D), AProf. Dr. Günther LOBIN dipl. paed., Paderborn (D), AProf. Dr. habil. Eva POLÁKOVÁ, Nitra (SK),

Enkonduko al eŭrologio

- o *7a de septembro*: 8:00–9:30, 9:45–11:15, 11:30–13:00, 14:00–15:45.
- Fina kursekzameneto: sabate, la 7an de septembro: 18:00–18:30

III. LIBERAJ PRELEGOJ

La prelegoj okazos en la ĉefa sesiejo, Tr. A. Hlinku 1, en la sekcisalonoj.

Humanistiko

H-p1 OProf. Carlo MINNAJA dr., Padova (I)

Hieronimo Cardanus, studento en Padova, tuteŭropa sciencisto

2002-09-03 (mar.), 14:00–14:40.

H-p2 AProf. Dr. habil. Eva POLÁKOVÁ, Nitra (SK)

Kunlaboro AIS kaj SAIS – nuneco kaj perspektivoj (slovake)

2002-09-06 (ven.), 9:00–9:40.

Struktursciencoj

S-p1 OProf. Horst. S. HOLDGRÜN dr., Göttingen (D)

Primoj

2002-09-02 (lun.), 14:00–14:40.

IV. LINGVOKURSOJ

L 01 ADoc. Dr. Maria BUTAN, Timișoara (RO)

I Lo-kurso por progresintoj; (unu studunuo)

2002-08-31 (sab.): 8:00–12:00 kaj 14:00–18:00, kun sekva finekzameneto.
(en la salono ĉe la strato Dražovska 2)

Krome, ASci. Eva Bondar ofertas I Lo-kurson por komencantoj, kiu okazos paralele kun la scienca programo, nome: de lundo 2002-09-02 al ĵaŭdo 2002-09-05, 8:00–9:30 kaj 17:00–18:30, sabate 2002-09-07 kaj dimanĉe 2002-09-08 8:00–9:30, en la salono Descartes.

V. KANDIDATAJ FINEKZAMENOJ

Ĉiu kandidato antaŭ sia finekzameniĝo nepre devas esti enskribiĝinta al minimume 3 kursoj de SUS (se ne jam havas la bezonatajn atestojn), inter kiuj minimume unu devas esti el la sekcio, en kiu li kandidatiĝas, minimume unu devas esti el alia sekcio. Maksimume unu atesto pri la lingvo-kurso de I Lo povas esti akceptita je ĉiu ŝtupo.

En almenaŭ unu kurso la kandidato devas partopreni la ekzamenon ricevante minimume la noton 6/10 (aŭ 7/10 ĉe kurso el la instruteko). Por la fina ekzameno ne estas akceptebla kandidato, kiu neniun SUS-kurson plejgrandparte sekvis kaj sukcese finis per ekzameno dum la koncerna SUS.

La ekzamenofico atentigas kandidatojn, ke prezentiĝo al la fina ekzameno sen antaŭa, regularkonforma kompletigo kaj disponigo de ĉiuj necesaj dokumentoj al la ekzamenoficejo povas kaŭzi aŭ rifuzon de havigo de mankantaj eroj nur post la publika fina ekzameno aŭ pagendan rekompencan superantan la normalan ekzamenkotizon pro la kromlaboro. Finan konstaton pri la plenuminteco de ĉiuj kondiĉoj nuntempe necesaj por akiri la agnoskon de sciencista grado ĉe AIS oni ne plu ricevos pli ol du jarojn post la finekzameno. Eksvalidiĝos do titol-agnoskoj, se

eventuale skribe fiksitaj kompletigpostuloj ne estos dum tiuj du jaroj plenumitaj de la kandidato. *Por eviti tiajn problemojn bv. ankoraŭfoje certigi, ĉu ĉiuj viaj ekzamendokumentoj jam troviĝas ĉe la ekzamenofico!*

La ekzamenoficon por la jaroj 2000–2003 konsistigas

Direktoro	OProf. Carlo Minnaja dr.
Asistanto	ADoc. Joanna Lewoc
sekcio 1 (kibernetiko)	OProf. Dr. habil. Reinhard Föbmeier
sekcio 2 (humanistiko)	AProf. Mag. Heinrich Dingeldein dr.
sekcio 3 (struktursciencoj)	OProf. Horst S. Holdgrün dr.
sekcio 4 (filozofio)	OProf. Dr. Helmut Angstl
sekcio 5 (natursciencoj)	OProf. Hans Michael Maitzen dr.
sekcio 6 (morfosciencoj)	AProf. Dr. Günter Lobin dipl. paed.

La finekzameno por kandidatoj, kiuj celas originale aŭ per adapta adopto akiri ĉe AIS la agnoskon de akademia nivelo (bakalaŭreco, magistrecio, doktoreco aŭ habilit-doktoreco), okazos en Komarno. La kandidatprelegoj estas publikaj. Ankoraŭ mankantaj buŝaj kaj skribaj fakekzamenoj (nepublikaj) okazos lunde (2an de septembro, 17:00–18:20, en la salono Euklides) kaj, se necese, dum afiŝotaj tempoj. La finekzamenoj okazos dum la jenaj tempointervaloj:

dato	horo	salono
5.09, ĵaŭdo	14:00–20:00	Gandhi
6.09, vendredo	8:00–9:30	Gandhi
	15:00–20:00	Gandhi
7.09, sabato	8:00–13:00	Komenský
	14:00–20:00	Komenský
8.09, dimanĉo	8:00–13:00	Boulangier
	14:00–15:20	Boulangier

VI. KADRA PROGRAMO

En la kadro de la ĉi-jara studadsesio la kibernetika sekcio aranĝas apartan programon. SUS-aligintoj povas partopreni en ĝi kontraŭ 30 EUR. Ĝi komenciĝos la 2an de septembro (lundo) kaj daŭros 3 tagojn. Pri ĉi-tiu aranĝo kaj pri aliaj okazaĵoj, paralelaj al la SUS-programo (la plej gravaj programeroj estas menciitaj kursive en la centra tabelo) bv. konsulti apartajn anoncojn kaj informilojn.

Tradicie AIS invitas ĉiujn partoprenantojn de la sesio al la **Akademia Forumo** kun publika diskuto (lunde, 2002-09-02, 18:30–20:00). La temo estos diskonigita komence de la sesio. La forumo okazos en la salono Boulangier ĉe la strato Dražovska 2.

Kursoj kaj kursfinaj ekzamenoj

Ĉiu SUS-partoprenanto rajtas senpage enskribiĝi kaj sekvi kursojn (tion jam inkluzivas la aliĝkoto). Kontraŭ aparta pago (la enskribiĝkoto al unu kurso estas 0,3 AKU; 80%aj rabatoj ekzistas por partoprenantoj el la reformeŭropaj landoj) oni ricevas oficialan ĉeestateston, ĉeestinte minimume 3/4jn, kaj noton, se oni sukcese partoprenis la kursfinan ekzamenon. La ekzameno povas okazi en skriba formo laŭ la metodo de elektrespondoj aŭ de liberaj respondoj (se la respondo konsistas nur el nomoj aŭ nombroj), tiel ke sufiĉas la kompreno de ILo kaj ne necesas propra esprimkapablo en la Internacia Lingvo. La kursfina ekzameno estas ripetbla.

Ankaŭ pri la *aŭdvidaj kursoj* ofertataj el la instruteko povas okazi ekzameno por studentoj, kiuj aŭ luprenis aŭ aĉetis la kurson, aŭ al ĝi enskribiĝinte (se ĝi estas ofertata) plejgrandparte sekvis ĝin dum SUS mem; atesto validas kiel pruvilo de akirita studunuoj nur tiam, se la noto superas 6/10jn. La samo validas por kursoj ofertataj de AIS en la interreto.

La kursfinaj ekzamenoj okazos markrede kaj ĵaŭde, laŭ la horaro. La SUS-partoprenantoj, kiuj intencas akiri kursatestojn, enskribiĝu al la kursoj ĉe la SUS-oficejo dum la akceptotago (dimanĉe, la 1an de septembro).

Prelegoj

La prelegkunsidoj estas gvidataj de la dekanoj (aŭ vicdekanoj) de la koncerna sekcio aŭ taskigitaj de ili. La partopreno en unuopaj prelegoj (kontraŭe al la partopreno en prelegserioj) por kandidatoj ne egalvaloras al kurspartopreno. En ĉiu sekcio la plejmulto de la prelegoj okazos en ILo.

Debutprelegojn prezentas novalkvitaj profesoroj, *docentiĝprelegojn* — estontaj plenrajtaj docentoj de AIS. La prelegoj daŭras po 45–60 minutojn (inkluzive diskuton kaj paŭzeton). La preleglingvo estas la Internacia Lingvo ILo.

La sama tempo estas je dispono por *invititaj prelegoj* (en iu ajn oficiala lingvo de AIS) kaj por *projektaceptigaj prelegoj* (en ILo) de kandidatoj, kiuj celas estontan originalan akiron (ne: adopton) de titolo ĉe AIS.

Ankaŭ de liberaj ISKanoj (t.e. de ISKanoj, kiuj ankoraŭ ne apartenas kiel adjunktoj aŭ efektivaj membroj al AIS) estas akcepteblaj t.n. *liberaj prelegoj* — pere de la dekanoj de la koncerna sekcio. Ili rajtas okazi en iu ajn oficiala lingvo de AIS kaj daŭri ĝis 25–40 minutojn.

(daŭrigo sur la paĝo 11)

SUS 25 en Nitra kaj Komarno (SK), 2002.08.30–09.08/1701–1702 pFR

	sekcio/salono	8.00–9.30	9.40–11.10	11.20–12.50	13.45–15.15	15.20–16.50	17.00–18.30	18.40–19.30	
VEN 02-08-30	Galilei ²	8.00–12.00: SAIS (Marček aŭ Geleta) Lingvokurso por komencantoj			14.00–18.00: SAIS (Marček aŭ Geleta) Lingvokurso por komencantoj				
SAB 02-08-31	Galilei ²	8.00–12.00: Butan Lingvokurso por progresintoj			14.00–18.00: Butan Lingvokurso por progresintoj				
DIM 02-09-01	Galilei ²		Ekde 11.00: urbopromenado	senatkunsido (11.00–13.00)	ekzamenofico (14.00–16.00) (ne publika)	ekzamenofico (konsultoj) 16.30–18.00	enskribiĝo akcepto	Ekde 20 h: Interk. Vesp. ³	
LUN 02-09-02	1 Schmidt 4 Descartes 6 Gandhi Boulanger ¹ Boulanger ² Euklides	Qued./Petrovic Bondar	Angstl Polák./Lew.-Q.	Subtena Sekt. (12.40–13.10) Malfermo 11.30–12.30	Polák./Lew.-Q.	Angstl Bondar	fakekzamenoj	Akad. Forumo 18.30–20.00	
MAR 02-09-03	1 Schmidt 2 Komenský 3 Euklides 4 Descartes 6 Gandhi	Minnaja Bondar	Angstl Polák./Lew.-Q.	Pennacchietti Qued./Lew.-Q.	Qued./Petrovic Minnaja	Pennacchietti Bondar Qued./Lew.-Q.	sekcikunsid. (sekcisalonoj)		
MER 02-09-04	1 Schmidt 2 Komenský 3 Euklides 4 Descartes 6 Gandhi	Minnaja Bondar	Angstl Polák./Lew.-Q.	Pennacchietti Qued./Lew.-Q.	Qued./Petrovic Minnaja	Pennacchietti Bondar Qued./Lew.-Q.	kursfinaj ekzamenoj 18.35 / 19.05		
JĀŬ 02-09-05	1 Schmidt Descartes	Qued./Petrovic Bondar	kursfinaj ekz. 9.45 / 10.30	12.30: Busveturado al Komarno					
		8.00–9.30	9.45–11.15	11.30–13.00	14.00–15.45	16.00–17.45	18.00–20.00		
	2 Komenský Gandhi	En Komarno			Eichhorn Eichhorn Bondar (17–18.30)	14.00 – 20.00: ekzamenoj Ludwig/Dikova (14.00–18.00)			
VEN 02-09-06	2 Komenský Gandhi	Eichhorn ekzamenoj 9.00–9.40 prelego			Eichhorn 15.00 – 20.00: ekzamenoj Gööz (14–17.15) Bartos (14–17.30) Ludwig/Dikova (14–18)		kursfina ekz.		
SAB 02-09-07	6 Gandhi Komenský	Fra./Lob./Pol. 8.00 – 13.00: ekzamenoj Gööz (8.00–11.15) Bartos (9.30–13.00) Bondar	Fra./Lob./Pol.	Fra./Lob./Pol. simpozio	Fra./Lob./Pol. 14.00 – 20.00: ekzamenoj		kursfina ekz.		
DIM 02-09-08	Boulanger Boulanger Boulanger	8.00 – 13.00: ekzamenoj Bondar	disputa forumo (9.00–11.00)		ekzamenoj Ĝen. As. AIS (15.30–16.20) Fermo (16.30–17.15)				

¹salono ĉe la strato Tr. A. Hlinku 1

²salono ĉe la strato Dražovska 2

³Hotel-Pensio kaj restoracio "Artin", Zobor

La salonoj estas nomitaj honore al la jenaj eminentaj personoj:

BOULANGER, George R. (1909–1982)

Fondinto (en 1957 j.) de l' Association Internationale de Cybernétique (Namur, B) kaj ties prezidanto ĝis la morto; enkondukis en ĉi tiun asocion 1980 ILOn kiel trian laborlingvon, eklerninte ĝin kiel 70-jarulo; vicprezidanto de la Eŭropa Klubo kaj membro de ties inicialgrupo AIS.

DESCARTES, René, latine: Renatus Cartesius, (1596–1650)

„La patro de moderna filozofio“, kiel oni ofte nomas lin, provis ligi filozofion al la natursciencoj aplikante por ambaŭ racian metodon. Sian mekanikecan mondpercepton li aplikis eĉ en la psikologio. Li skizis ankaŭ principojn de planlingvo en letero de la 20a de novembro 1629 j. al la benediktana scienculo Mersenne.

EUKLEIDES de Aleksandrio (ĉ. 300 a. K.)

Greka matematikisto kaj naturesploristo, kiu laboris sub Ptolomaos I ĉe la „Museion“ en Aleksandrio. Lia plej fama verkaĵo estas la libro „Elementoj“, aksioma prezento de la tuta tiama geometrio kaj aritmetiko. Krome li verkis inter alie manualon „Geometria optiko“ kaj aliajn traktaĵojn pri planimetrio, sfero kaj matematika muzikteorio.

GALILEI, Galileo (1564–1642)

Kvankam liaj ideoj troviĝas kadre de la kristana mondkoncepto, la itallingva natursciencisto konfliktis kun la katolika eklezio pro sia verko pri la galaksimodeloj, en kiu li argumentas por la nova, kies centro estas la suno. Kiel unu el la unuaj sciencistoj li ne plu verkis en la latina lingvo, nekomprenata de pli vasta publiko.

GANDHI, Mohandas Karamchand (1869–1948)

Hinda politikisto, kiu proklamis senarman ribelon kontraŭ la okupadaj trupoj, per manspinado kontraŭ la tekstilaj fabrikoj de Britio, per „salmarŝo“ kontraŭ la brita salmonopolo, per reiro al simpla natura vivoformo, por formi sendependan komunan ŝtaton de hinduoj kaj islamanoj. Li subtenis la ideon de la Internacia Lingvo, kunlaborante kun la svisa sciencisto Edmond Privat.

KOMENSKÝ, Jan A., latine: Johannes A. Comenius (1592–1670)

La fondinto de moderna pedagogio ne nur teorie, sed ankaŭ praktike kontribuis al sia fako, i.a. per facila lingvoinstrua legolibro. Li proponis la enkondukon de planlingvo kaj la starigon de internacia akademio de la sciencoj.

SCHMIDT, Hermann (1894–1968)

Jam en la jaro 1941 la germana fizikisto kaj reguladteknikisto prezentis la bazajn principojn de kibernetiko. Ekde ĉ. 1962 li pli kaj pli influis la filozofion de la klerigkibernetiko kaj de aliaj antropokibernetikaj branĉoj.

Ankaŭ *koncizprelegoj* (10–20 minutaj) rajtas okazi en ajna oficiala lingvo de AIS. Ili estas ankoraŭ post la starigo de la SUS-programo oferteblaj pere de la (vic)dekano aŭ (vic)fakarestro de la koncerna sekcio. Ĉiuj temoj de kromaj koncizprelegoj ne surlistigitaj en la programkajero estos bontempe afiŝataj dum SUS laŭ la indikoj transdonitaj de la prelegontoj al la SUS-oficejo.

Aliĝo

Por aliĝo bv. uzi la kunmetitan aliĝilon kaj resendi al la senata sekretario (ADoc, Joanna Lewoc, Karl-Schwarzschild-Weg 6/317, D-37077 Göttingen; tel.: +49/551-376072; blewo1@hrz.uni-paderborn.de). Se vi bezonas vizon por Slovakio, bv. turniĝi al la loka organizantino AProf. Eva Poláková, Potravínárska 19, SK-94901 Nitra (epolakova@ukf.sk, epolakova@in.slovanet.sk).

La SUS-aliĝo rajtigas vin

- partopreni publikajn oficialaĵojn kaj ĉiujn erojn de la kadra programo, pri kiuj la programbulteno aŭ SUS-oficejo ne informas pri aparta pago,
- partopreni ĉiujn kursojn kaj prelegseriojn (sen rajto ekzameniĝi), prelegojn kaj finajn ekzamenigojn
- ricevi la programkajeron kaj, fine de la sesio, partoprenantarliston,
- ricevi propran insignon, kiu konfirmas la laŭregularan aliĝon (por AIS-studentoj la insignon anstataŭas ilia aktuala legitimilo).

La aliĝkotizo estas pagenda ankaŭ de *kursgvidontoj* kaj *prelegontoj* (nepre antaŭ la limdato por anonciĝoj je 2002-03-30; sen antaŭe konstatebla pago de la SUS-aliĝkotizo la anonciĝoj ne povas esti konsiderataj por la programo). La *kandidatiĝo* estas pritraktebla ankaŭ nur post la alveno de via SUS-aliĝkotizo.

Anoj de ISK kaj AIS povas pagi per sia individua konto ĉe la akademio. Se la stato de via servobonhavo ampleksas la necesan sumon, ne estas bezonata kroma ĝirado; la aliĝkotizo estos deprenita aŭtomate post via anonciĝo al la sesio.

Ĝis unu monato antaŭ la komenco de la sesio (t.e. ĝis la 2002-07-30) la aliĝkotizo estas nur 0,3 AKU; post tiu dato ĝi kreskas al 0,5 AKU. La kotizo estas pagebla laŭ la jenaj manieroj (bv. nepre indiki la pagocelon kaj nomon de la aliĝanto):

- ➡ al la AIS-konto n-ro 2051-305 ĉe poŝtbanko Hannover (bank-kodo 25010030)
- ➡ ĉeke — senpere al la trezoristo: Prof. B.-A. Wickström, Institut für Finanzwissenschaft, Humboldt Universität, Spandauer Str. 1, D-10178 Berlin; tiukaze bv. nepre aldoni (egalvaloron de) 10,- EUR pro la bankkosto

Kotizo por taga partopreno en la sesio estas po 0,2 AKU. Bonvolu atenti, ke aliĝkotizo ne kovras ekzamenkostojn, kurskotizojn, tranokt-kostojn ktp.

Loĝado

En Nitra troviĝas pluraj hoteloj, kiujn rekomendas la lokaj organizantoj. Bv. atenti, ke ne ĉiuj disponas pri liberaj ĉambroj dum al tuta SUS-aranĝo.

- Club Hotel *Amfiteáter*, Dolnozoborská 18, tel.: +421 37 6511705, +421 901724364 (1-lita 1.000 SK, 2-lita 1.800 SK; libera tempo: 1–6. 9)
- Hotel *Olympia*, Tr. A. Hlinku 57, tel.: +421 37 6536727 (1-l. 830 SK, 1-l. kun komuna duŝejo 430 SK, 2-l. 1.020 SK, 2-l. kun komuna duŝejo 740 SK; libera tempo: 1–5.9)
- Hotel *Tenis*, umbierska 2, tel.: +421 37 6533681, +421 37 7336347 (2-l. 500 SK, 2-l. + kromlito 700 SK; libera: 1–6.9)
- Penzió *Zoborská*, Dolnozoborská 8, tel.: +421 37 6511194, +421 903465423 (2-l. 1.800 SK; libera: 1–4.9)
- Hotel *Koruna*, Svätoplukova 2, tel.: +421 37 6512315-7, faks.: +421 37 6512318 (2-l. 2.400 – 2.800 SK; libera: 1–4.9)
- Hotel *Zlatý Kúik*, Zobor, tel.: +421 37 6550289, faks.: +421 37 6550293 (2-l. 2.500 SK; libera: 1–3.9)
- Hotel *Zobor*, Štefánikova 5, tel.: +421 37 6525381-3, faks.: +421 37 6525060
- Hotel *Nitra*, Wilsonovo nábr. 88, tel.: +421 37 6534242-4, faks.: +421 37 6533396

En studenta hejmo estas aranĝebla malmultekosta loĝeblo: unu tago (tranokto kaj tagmanĝo) kostas por studentoj 3 USS, por plenkreskuloj 4 USS. Bv. kontaktiĝi kun la loka organizantino.

Mono

Kadre de AIS kostoj kaj prezoj estas indikataj ĝenerale en „Akademiaj Kotiz-Unuoj“ (AKU). 1 AKU valoras nun 65 eŭrojn. Subtenaj membroj same kiel ĉiuj membroj de la Internacia Scienca Kolegio (ISK), Internacia Arta Kolegio (IAK) kaj Internacia Teknika Kolegio (ITK) de AIS havas individuan subkonton („servobonhavo“), de kiu eblas i.a. senkosta ĝiro al aliaj individuaj AIS-kontoj kaj pago al AIS.

Al servobonhavo estas aŭtomate alkalkulataj honorarioj (ekzemple pro la laŭregulare realigita kurso aŭ prelego akceptita por la antaŭe presita programo), aŭtomate dekalkulata estas la jarkomence pagenda membrokotizo. Kromaj dekalkuloj okazas laŭ sciigo de la servobonhavo-posedanto (ekz. aliĝkotizoj), se la kontostato tion ebligas. Ĉe la SUS-oficejo ne eblas ŝanĝi monon inter diversaj monsystemoj. Ĝenerale estas akceptataj enpagoj nur en eŭro.

SENATO KAJ SENATAJ OFICOJ 2000-2003

Senatano pri publikaj rilatoj kaj informado; direktoro de la informofico

- OPROF. DR. HABIL. REINHARD FÖSSMEIER (Vicedirektoro: OProf. H.-D. Quednau)
Rahel-Straus-Weg 19, D-81673 München; tel.: +49/89-43109430;
info@ais-sanmarino.org

Senatano pri akademia identeco, direktoro de la identecofico; prezidanto

- OPROF. DR. HABIL. HELMAR FRANK
Kleinenberger Weg 16, D-33100 Paderborn; tel.: +49/5251-163511;
hfr@uni-paderborn.de

Senatano OPROF. HORST S. HOLDGRÜN DR.

- Mathematisches Institut der Universität, Bunsenstr. 3–5, D-37073 Göttingen;
tel.: +49/551-397764; holdgrun@uni-math.gwdg.de

Senatano pri publikigo kaj protokolado; direktoro de la publikig- kaj protokol-ofico; Senata Sekretario:

- ADOC. MAG. JOANNA LEWOC (Vicedirektoro: OProf. H. S. Holdgrün dr.
membro: OProf. Dr. habil. R. Fössmeier)
Karl-Schwarzschild-Weg 6/317, D-37077 Göttingen; tel.: +49/551-376072;
blewo1@hrz.uni-paderborn.de

Senatano pri honorado; direktoro de la honoradofico

- OPROF. HANS MICHAEL MAITZEN DR.
Institut für Astronomie, Türkenschanzstr. 17, A-1180 Wien; tel.: +43/1-4706800-60
maitzen@astro.ast.univie.ac.at

Senatano pri ekzamenoj; direktoro de la ekzamenofico; vicprezidanto

- OPROF. CARLO MINNAJA DR. (Asistanto: ADoc. Mag. Joanna Lewoc,
membro: OProf. Horst S. Holdgrün dr.)
Dipartimento di Matematica Pura ed Applicata, Via Belzoni 7, I-35131 Padova;
tel.: +39/049-8275906; minnaja@libero.it

Senatano pri la akademia strukturo; direktoro de la strukturofico:

- OPROF. CARLO MINNAJA DR. (Vicedirektoro: OProf. Hans Michael Maitzen dr.)

Senatano pri esplorado kaj evoluigado; direktoro de la sciencofico

- OPROF. FABRIZIO PENNACCHIETTI DR. (Vicedirektoro: OProf. H. S. Holdgrün dr.)
Via delle Rosine 10, I-10123 Torino; tel.: +39/011-8178242; pennacch@cisi.unito.it

Senatano pri studado; direktoro de la klerigofico

- OPROF. HANS-DIETRICH QUEDNAU DR. (Vicedirekt.: OProf. Dr. habil. R. Fössmeier)
Forstwissenschaftliche Fakultät, Am Hochanger 13, D-85354 Freising;
tel.: +49/8161-714765; quедnau@lrz.tu-muenchen.de

Senatano pri financoj; direktoro de la financofico; trezoristo

- OPROF. BENGT-ARNE WICKSTRÖM DR. (Vicedirektoro: OProf. H. S. Holdgrün dr.)
Institut für Finanzwissenschaft, Humboldt Universität, Spandauer Str. 1,
D-10178 Berlin; tel.: +49/30-20935655; trezoristo@ais-sanmarino.org

SEKCIOJ KAJ FAKAROJ DE AIS

Kibernetiko Dekano: OProf. Klaus Weltner dr.

Schumannstr. 57, D-60335 Frankfurt; weltner@em.uni-frankfurt.de

- 1.1. Antropokibernetiko (psikokibernetiko, lingvokibernetiko, klerigkibernetiko, kibernetikaj komunikada kaj dokumentada sciencoj, socikibernetiko, ekonomikibernetiko)
- 1.2. Ĝenerala kibernetiko (teorio de informacio kaj kodigo, teorioj de algoritmoj, logikaj ŝaltretoj, abstraktaj aŭtomatoj kaj adaptivaj (celorientitaj) sistemoj, teoria informadiko, komputil-arkitekturo, ĝenerala teorio de retrokoplado kaj reguligo, teorio de strategiaj ludoj)
- 1.3. Inĝeniera kibernetiko (maŝina aŭ inĝeniera kibernetiko [teknologioj de telekomunikado, de informstorado, de reguligo, de komputiloj kaj de aŭtomacio, aplikata informadiko])
- 1.4. Biokibernetiko (genetiko, neŭrofiziologio, teorio de retrokoplado en organismoj, kibernetika medicino, komunikado kaj konduto de bestoj)

Humanistiko Dekano: OProf. Fabrizio Pennacchiotti dr.

Via delle Rosine 10, I-10123 Torino; pennacch@cisi.unito.it

- 2.1. Bazaj neparametraj antroposciencoj (neparametraj psikologio, lingvistiko, klerigscienco, komunikada kaj dokumentada sciencoj)
- 2.2. Soci-sciencoj neparametraj (neparametraj pedagogio, administraci-scienco, sociologio, ekonomiko, etnologio, jurscienco, politologio)
- 2.3. Artsciencoj neparametraj (muzikologio kaj muzikhistorio, estetiko kaj historio de la porvidaj artoj, literaturscienco (specialc beletriko), estetiko kaj historio de la scenejaj artoj)
- 2.4. Integraj kultursciencoj (etnologio, sociogeografio, kulturgeografio, kompara religiscienco, religihistorio, ekonomi-historio, ĝenerala historio, bibliotekscienco)

Struktursciencoj Dekano: OProf. Horst S. Holdgrün dr.

Mathematisches Institut, Bunsenstr. 3-5, D-37073 Göttingen; holdgrun@uni-math.gwdg.de

- 3.1. Pensadstruktursciencoj (simbola logiko, teorio de (mal)precizaj aroj, ĝenerala aksiomatiko, aritmetiko, nombroteorio, probablokalkulo, matematika statistiko, matematikdidaktiko)
- 3.2. Imagadstruktursciencoj (geometrio, kinematiko, ĝenerala sistemiko)
- 3.3. Formalaj matematikaj sciencoj (algebro, teorio de serioj, funkcioj, ekvacioj, distribucioj ktp., kalkuloj de vektoroj, matricoj, diferencialoj, integraloj, ĝenerala strukturteorio)

Filozofio Vicdecano: OProf. Dr. Helmut Angstl

Betschartstr. 14, D-81243 München; Helmut.Angstl@t-online.de

- 4.1. Filozofiaj bazosciencoj (filozofia logiko, ontologio, scmiotiko, ĝenerala modelteorio, epistemologio)
- 4.2. Filozofiaj valorteorioj (filozofia estetiko, aksiologio, moralfilozofio, jurfilozofio, ŝtat-filozofio)
- 4.3. Metasciencoj (historioj kaj filozofioj de la unuopaj sciencoj kaj sciencobranĉoj, idehistorio, historio de la filozofio, historio de la unuopaj sciencoj)

Natursciencoj Dekano: OProf. Hans-Dietrich Quednau dr.

Forstwissenschaftliche Fakultät, Am Hochanger 13; D-85354 Freising; quедnau@lrz.tu-muenchen.de

- 5.1. Substancikoj (fiziko, fizikaj teknologioj (konstrustatiko, mekanika teknologio, elektro-teknologio, maŝinkonstruado), kemio, kemiaj teknologioj)
- 5.2. Mondikoj (geosciencoj kaj astrosciencoj [astronomio, meteorologio, geodezio, naturgeografio, geologio, paleontologio])
- 5.3. Biosciencoj (ĝenerala biologio, biometrio, botaniko, zoologio, klasika (t.e. bio-)ekologio, humanbiologio.);
Departamento pri medicino (medicino, bestomedicino, farmacio, nutradscienco)

Morfosciencoj Dekano: (komisiite) AProf. Dr. Günter Lobin dipl. paed.

Sylter Weg 11, 33102 Paderborn, blobi1@hrz.uni-paderborn.de

- 6.1. Aŭdvidaj formkreado kaj dokumentado (sonstudioteknologio, grafika teknologio, sportscienco, filmstudioteknologio, sciencaj fotado, filmado, surbendigo ktp., muzeologio, parolteknologio, retoriko)
- 6.2. Ilar-morfologio (ergonomiko, formigo de industriaj produktoj, laborformteknologio, formigo de laborlokoj)
- 6.3. Mediplanado (arkitekturo, ĝardenformigo, agronomio, urba kaj regiona planadoj, trafikplanado, ĝeneraligita homo- kaj natur-ekologio, turismiko)

Invito al la Asembleo de la Subtena Sektoro

Plenumante la artikolon 16.1 de la Apendico al la Statuto, kaj la artikolon 1.7 de la Regularo pri kunsidoj, estas kunvokata la Asembleo de la Subtena Sektoro de AIS al ties kunsido, kiu okazos vendrede, **la 2an de septembro 2002**, 12:40-13:10 en la sesiejo de la 25a SUS, salono Descartes, en Nitra (SK). La tagordo estas:

1. Formalaĵoj (ĉeestanteco, laborlingvoj, protokolo, tagordo, ĉeestrajto, kvorumeco).
2. Ĝenerala raporto.
3. Financa raporto; senŝarĝigo; AKU-kurzo.
4. Decidoj pri proponoj skribe alvenintaj plej malfrue 24 horojn antaŭe.
5. Kromaj tagordaj punktoj eventuale antaŭe anoncitaj per invitletero aŭ deciditaj dum la tagorda punkto 1.
6. Eventuale necesaj elektoj.
7. Diversaĵoj.

Invito al la Ĝenerala Asembleo de la Scienca Sektoro

Plenumante la artikolon 8.2 de la Apendico al la Statuto, kaj la artikolon 1.8 de la Regularo pri kunsidoj estas kunvokata la Ĝenerala Asembleo de la Scienca Sektoro de AIS al ties 26a kunsido, kiu okazos marde, **la 8an de septembro 2002**, 15:30-16:30, en la sesiejo de la 25a SUS, salono Boulanger, en Komarno (SK). La tagordo estas:

1. Formalaĵoj (ĉeestanteco, protokolo, tagordo, ĉeestrajto, kvorumeco).
2. Ĝenerala raporto de la senato.
3. Financa raporto, senŝarĝigo, buĝeto.
4. Decidoj pri proponoj de la senato kaj pri aliaj proponoj skribe alvenintaj plej malfrue 72 horojn antaŭe kaj legeblaj en la SUS-oficejo almenaŭ 24 horojn antaŭe.
5. Kromaj tagordaj punktoj eventuale deciditaj dum la tagorda punkto 1.
6. Eventuale necesaj elektoj.
7. Diversaĵoj.

La distribuo de materialoj aŭ la afiŝado kie ajn tio povus kaŭzi la impreson de aprobo de AIS bezonas la antaŭan permeson de la (vic)prezidanto resp. de la direktoro de la Subtena Sektoro. Por tio ekzistas speciala afiŝejo. Dum la sesio bv. sekvi la plej aktualajn sciigojn de la SUS-oficejo anoncatajn sur tiu ĉi informtabulo.

© Kopirajto: AIS.

Stato: 2002-07-18/1701pfR (PPO/jl)

Prezo de la programo: 0,03 AKU (senpaga ekzemplero al partoprenantoj)